

El la foto-teko de kursgvidanto

Okazis en tiu epoko iu cirkonstanco kiu igis kreskiĝi la nombro de la esperantistoj en nia urbo. La E-Grupo de **El Entrego**, **La Verda Kolombejo**, kiun ni kelkfoje menciis en nia raporto, ĉesis en sia aktivado; plejparto el ĝiaj membroj forlasis tiun urbon kaj translokiĝis al aliaj lokoj. Kelkaj el ili elekto ĝis de tiam en Gijón, kaj de tiam membris ĉe nia esperantista rondo. Fakte iuj el ili estis pli ol nuraj membroj, sed veraj aktivuloj: Juan Manzano, Sacramento Collado kaj, ĉefe, Adonis González Meana.

Pliaj membroj kaj aktivuloj estis barbitaj, fine de la periodo kiun ni priraportas, inter la ĉeestintoj de la kurso 1975-1976. La lernantaro de tiu kurso estis pli multenombra ol tiu de la antaŭaj jaroj. Partoprenis en ĝia komenco kelkdeko da gelernantoj. Eĉ konsiderante ke kelkaj el ili estis ĉeestintaj jam antaŭajn kursojn, tamen la nombro da novbakitaj samideanoj estis konsiderinda. Iu el tiuj novaj E-lernantoj memoras la komenciĝon de tiu kurso, kiun li priskribas tiele:

*La unua klaso de la kurso havis ian solenan karakteron. Krom la lernantaro, sufiĉe multenombra, estis tie kelkaj elstaraj personoj de la urba kaj regiona esperantistaro. Antaŭe mi estis koninta preskaŭ neniun el tiuj personoj; nur poste mi sciis la rolon kiun ili ludis en la disvastigado de Esperanto en Asturio. Ekzemple, estis tie Alberto Menéndez, kiu, kvankam li jam ne plu dediĉiĝis al la Esperanta instruado, tamen li plurfoje vizitadis nin dum la kurso. Estis ankaŭ la fratoj González Meana, Alcibiades kaj Adonis. La unua ne loĝadis en Gijón kaj ne estis membro de la E-grupo de tiu-ĉi urbo, sed tamen estis li kiu gvidis la unua klason. Poste, la cetero el la kurso estis gvidita de Santiago Mulas. Laŭlonge de la kurso iom-post-iom la nombro da gelernantoj sufiĉe malpliiĝis, tamen, proksimume deko da ili persisitis ĝis la Kurso-fino kaj restis poste kiel membroj de la E-Grupo Jovellanos. En la landa kongreso de Esperanto, kiu okazis en* ***El Ferrol*** *en 1976 kelkaj el ni atingis la titolon de "kapabla esperantisto" en la ekzamenoj kiujn ni partoprenis tie.*

Menciindas tio ke la tiuepoka prospero de Esperanto en Gijón koincidis kun paralela dekadenco de la E-movado en la cetero el la Asturia regiono. Eble la kialo de tiu kontrasto estis la fakto ke tiam Gijón estis kreskiĝanta urbo de industria vidpunko kaj de loĝantaro.

La pliviglîĝo de la urba esperantistaro permesis entrepreni la reorganizadon de la E-grupo kun elekto de nova komitato kaj normala organiza funkciado dum la sekvintaj jaroj.